# Invitilo al komuna programo de Esperantista klubo Brno kaj Esperantista klubo Gliwice

Ni kore invitas vin al sekva komuna programo de du esperantistaj kluboj.

Temo.

## Historia salminejo en Wieliczka

**WIELICZKA** estas malgranda urbo situanta ĉirkaŭ 15 kilometrojn sudoriente de Krakovo, kie meze de la 13-a jarcento oni malkovris salvejnon. Salo estis tie elfosita dum pli ol 700 jaroj. La Salminejo Wieliczka estas la plej malnova minejo en Pollando kaj unu el plej malnovaj en Eŭropo. Ekde 1996 oni ne plu ekspluatas salon. Ekde la jaro 1978 ĝi troviĝas sur la listo de kultura kaj natura heredaĵo de UNESCO. Dum la prelego vi ekkonos historion de la salminejo kaj rigardos fotojn el la turista vojo.

**Kiam:** la 17-an de junio 2026 je **19.00** (UTC+2)
**Prelegonto**: Magdalena Tatara
**Lingvo**: Esperanto

**Kie: La renkontiĝo okazos rete per Zoom**

Jen la ligilo: https://polsl-pl.zoom.us/j/93116604802?pwd=MGJzQ0pmeklOMCtYamJUMlA0all2Zz09

Enirkodo: 931 1660 4802

Pasvorto: 235959.

La prelego estos registrata.

Ni rekomendas, ke vi uzu aŭskultilojn kun mikrofono por preventi eĥon. Sed ne estas bezonata, vi povas uzi mikrofonon en via portebla komputilo (notebook).

# Ni rekomendas

---

- 23an-26an de julio 2026 43-a Pola Esperanto-Kongreso, Bielsko-Biała, Pollando.
- 1-a — 8-a de aŭgusto 2026 111-a Universala Kongreso de Esperanto, Graz,

Aŭstrio

- Trapasu [KER ekzamenon](), montru, ke vi regas Esperanton.

# Cetera programo en junio

La 24an **Ekskurso al kastelo Veveří kaj digolago**, *renkontiĝo, promeno. Renkontiĝo je la 15.45, la ŝipo forveturos je 16.00*

---

*La prelego pri salminejo estos la lasta reta programo kaj ankaŭ lasta prelego antaŭ la ferioj. Nia lasta antaŭferia renkontiĝo estos promeno laŭ digolago.*

*Ni dankas al ĉiuj, kiuj partoprenis niajn aranĝojn. Kaj precipe ni dankas al ĉiuj, kiuj kontribuas al nia programo. Sen vi ni tute ne povus realigi tiel buntan programon. Ni ankaŭ dankas al klubo el Gliwice, kiu kunorganizas la retan programon. Dum la ferioj (junie kaj aŭguste) nia klubo ne organizas regulajn kunvenojn. Nek ĉeestaj, nek retajn. Ni denove renkontiĝos la 2an de septembro en la klubejo, la unua reta programo okazos la 9an de septembro. Jam vi povas pripensi, kiel vi kontribuos aŭtuno al la programo.*

*Ĝuu la someron kaj verŝajne ni renkontiĝos dum someraj Esperanto-aranĝoj.*


## Esperantista klubo Brno

Bosonožská 323/15, Brno
Czech Republic



Vi recevis la mesaĝon, ĉar vi estas membro de Esperantista klubo Brno, ĝia favoranto aŭ vi petis aboni invitilojn de nia klubo. Se vi ne estas membro de la klubo, vi povas malaboni tiujn mesaĝojn.

Malaboni